tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo
Časopis Hrvatskog saveza za esperanto

decembro 2013 / n-ro 120

- **Prezidento de Respubliko Kroatio d-ro Ivo Josipović aŭspicias Kongreson de Eŭropa Esperanto-Unio**
- **Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en Rijeka de la 6a - 12a de julio 2014**
- **Elektoj en Kroata Esperanto-Ligo**
- **Lucija Borčić tradukis romanon *Jaša la Dalmato – vicreĝo de Guĝerato* de Ivana Brlić-Mažuranić**

Karaj legantoj

En la manoj vi tenas la jubilean 120an numeron de **Tempo**!

Estas agrable scii ke ni atingis de post la jaro 1980 la 120an numeron de nia gazeto.

Jen la jaro 2014 antaŭ ni! Estu ĝi por ni ĉiuj sukcesa!

Sur la titolpaĝo, fotita de **Davor Klobučar** en la jaro 2007, vi vidas ke Esperanto antaŭenmarŝas en **Rijeka**: tien alvenos en julio 2014 eŭropaj esperantistoj por kongresi pri eŭropaj temoj. Prezidento de **Kroatio D-ro Ivo Josipović** akceptis aŭspicion de la 10a Eŭropa Esperanto-Kongreso en **Rijeka**. Ni publikigas la salutleteron al la kongreso de la Prezidento disponigitan al **Tempo** de la sekretario de EEU **Zlatko Tišljar**. Bonvolu informiĝi pri la provizora programo de la kongreso en **Rijeka**, kiu disponigas sian unuan tagon por la **Kroata Tago**.

En la jaro 2014 finiĝas la mandato de la asembleo de KEL kaj de la prezidantaro. La elektoj komenciĝis. Ĉu vi ŝatus engaĝiĝi por gvidaj organoj de nia asocio? Bonvolu vidi la artikolon pri la temo **Elektoj** 2014 el la plumo de **Anto Mlinar**.

Dunja Šverko el **Križevci** salutas vin ĉi-numere, kun bondeziroj por la jaro 2014, per la pomo sur sia foto (dekstre).

La domo de la **Centra Oficejo** de **Universala Esperanto-Asocio** en **Roterdamo** sur la foto de **Francisco L. Veuthey** estas la loko**,** kie kandidatiga letero de **Zagrebo** por **Universala Kongreso de Esperanto** atendas respondon. Kiu urbo estos la kongresa urbo post **Lille** en 2015, ankoraŭ ne estas konate: **San Francisco**, **Lisabono**, **Seulo**? **Zagrebo**? Iu alia?

Ni finis la jaron 2013 per decembraj festoj de **Zamenhof-Tago**. Pri la bela zagreba festo raportas **Zdenka Polašek,** pri la festo en **Rijeka** kaj en **Triesto** informas **Vjekoslav Morankić.** La foton el **Triesto** prizorgis **Giuseppe Valle.** Pri la evento en **Varaždin** la fotojn sendis **Stanko Rukelj.** La zagreban feston fotis **Ivan Špoljarec.**

Dum en novembro **Esperanto-Societo Sisak** festis sian 35-jariĝon, **Esperanto-Societo Božidar Vančik** en **Varaždin** atingis sian 90-an vivojaron en 2013.

Lucija Borčić inspiras per sia energio**:** ŝi tradukis la lastan romanon de **Ivana Brlić-Mažuranić** ***Jaša la Dalmato – vicreĝo de Guĝerato*** (Jaša Dalmatin - potkralj Gudžarata) kaj regalas nin per memoroj pri la infanaĝaj gustoj en sia ĉi-numera poemo pri la bongustaĵoj el la vitejoj el **Vis.**

En decembro ni finkolektis la artikolojn el kroataj amaskomunikiloj en kiuj Espranto estas traktata kaj sendis centon da ili kun kopioj de pluraj TV- kaj radio-elsendoj al **Japanio** por kandidati por **Premio Cigno 2013**. La prizorganto de la **Premio Cigno Etsuo Miyoshi** en novembro 2013 estis aparte honorigita per medalo de la japana imperiestro por siaj inventaĵoj por personoj kun handikapo.

Davor Klobučar konsilas ĉi-numere kiel eblas pli efike uzi Esperanton en la reta mondo.

Tibor Sekelj, kies jaron ni festis en 2013, ricevis propran filmon, la amatoran filmon en kiu du junuloj el **Subotica** postiras liajn spurojn en **Sud-Ameriko**: unu knabo direktiĝas al **Akonkagvo**, la alia al **Patagonio**, kune ili serĉas spurojn de **Kumeŭaŭa** en **Brazilo**. Vi povas informiĝi ke post bela rakonto ***Padma, la eta dancistino***, eldonita en somero en Esperanto ĉe **Grafokom Đurđevac**, samloke prepariĝas plia esperantlingva traduko de **Tibor Sekelj *De Patagonio ĝis Alasko*,** kiun esperantigas pluraj tradukantoj**.**

Ni finis la jaron 2013 per kuraĝiga redukto de nia kredito **por Vodnikova:** nia granda kredito de **50.500 eŭroj** nun reduktiĝis al **7.752 eŭroj.** Bonvolu vidi la ritmon de la repagado de aliaj kreditoj en la rubriko **Vodnikova 9.**

El **Poreč** startis iniciato pri komencanta Esperanto-kurso, kiu en 2014 helpu pri la internacia lingvo informi membrojn de **Grupo Bruno Gröning.**

Sekretariino de **KEL Spomenka Štimec** devis pro malsano de familiano redukti kvanton de deĵorhoroj en **Zagrebo**.

Nian decembran numeron ni finas per bondeziroj por feliĉa **Kristnasko** kaj sukcesa jaro **2014.**

Speciale ni dankas al **Turisma asocio de la urbo Zagrebo** kiu financas tiun jubilean numeron de **Tempo, kaj kiu afable disponigis komputilon por la agado de KEL**. **Koran dankon!**

S. Štimec

tempo

Fondita en 1980. Ne aperis en la militaj jaroj 1993 kaj 1994. Aperas laŭeble kvarfoje jare. Jaro XXXII, numero 120 (3/2013).
ISSN 0352-1583. Tiu ĉi numero estas eldonita per financa helpo de **Turisma Asocio de Urbo Zagrebo**. **Tempo** aperas sone sur kompaktdisko ĉe Unuiĝo de nevidantaj esperantistoj, Zagreb. Voĉlegas Spomenka Štimec.
Redakcio/Uredništvo; **Eldonisto**/Izdavač: Hrvatski savez za esperanto/Kroata Esperanto-Ligo, Kneza Mislava 11/III, HR 10000 Zagreb, Kroatio, tel. +385 (1) 4617550, esperanto@zg.t-com.hr, **www.esperanto.hr**, IBAN HR6124840081100881157; OIB 53992829935
Kontribuis: Lucija Borčić, Marija Belošević, Nataša Dorosulić, Etsuo Miyoshi, Ivana Brlić-Mažurnić, Mihaela Cik, Davor Grgat, Davor Klobučar, Stipan Milodanović, Anto Minar, Vjekoslav Morankić, Zdenka Polašek, Stanko Rukelj, Ivan Špoljarec, Spomenka Štimec, Dunja Šverko, Zlatko Tišljar, Turistička zajednica grada Zagreba (Turisma asocio de la urbo Zagrebo), Giuseppe Valle, Francisco L. Veuthey, Barbara Weizer.
Redaktoris: Spomenka Štimec. **Grafike aranĝis:** Ivan Špoljarec. **Presis:** Urednik d.o.o., Zagreb
Anonctarifo: 1/1 paĝo 1000 kn (135 eŭroj), ½ paĝo 500 kn (68 eŭroj), lasta titolpaĝo 2500 kn (328 eŭroj). **Abono** por kvar numeroj jare 60 kn. Por eksterlando 10 eŭrojn. Unuopa numero enlande 15 kn, eksterlande 3 eŭrojn.
La redakcio ne respondecas pri la opinioj de la subskribitaj artikoloj.

Elektoj en KEL en 2014

La sekretariino de **Kroata Esperanto-Ligo** (**KEL**) **Spomenka Štimec**, dum la kunsido la 23-an de novembro 2013, informis la Estraron de KEL ke „la lastaj elektoj por Asembleo okazis en la junio 2010 kaj ke la mandatoj daŭras ĝis la junio 2014, kio signifas ke jam nun oni bezonas komenci prepari la elektojn por la nova konsisto de la Asembleo en la jaro 2014, respektante la preskribitan statutan procedon“. Post la diskuto kiu sekvis tiun informon, la Estraro decidis ke la Estraro anoncu la elektojn por membroj de la **Asembleo**. La Estraro nomumis la Elektan komisionon kiu komencos tuj prepari ĉion necesan por ke la elektoj okazu ĝustatempe.

Por ke nia membraro estu kiom eble plej bone informita pri la senco de tiu procedo, necesas doni la plej gravajn informojn pri la organiza parto de Kroata Esperanto-Ligo. KEL estas la tegmenta organizo de ĉiuj nialandaj E-organizaĵoj kaj individuaj membroj kiuj decidis akcepti KEL kiel sian tegmentan organizon. Aliflanke KEL kiel kroata Landa Asocio estas membro de Universala Esperanto - Asocio (UEA). UEA estas la plej granda tegmenta organizo de esperantistoj en la tuta mondo.

La leĝan pozicion KEL reguligis laŭ la preskriboj de Leĝo pri asocioj (kroate: Zakon o udrugama). Konkorde al sia statuso KEL havas sian Statuton laŭ kiu ĉiu Esperanto-organizaĵo en Kroatio propravole povas fariĝi membro de KEL kaj per tiu membreco ankaŭ parto de Universala Esperanto-Asocio kaj Eŭropa Esperanto-Asocio. Esperantistoj konsideras Universalan Esperanto-Asocion la plej grava Esperanto-organizaĵo en la mondo. Krom tio ekzistas laŭstatute reguligita aparta elektounuo „individuaj membroj“ de KEL.

Do, kiam ni parolas pri elektoj por Asembleo de KEL kiel tegmenta organizo, tio signifas ke ĉiu Esperanto-unuiĝo, kiu membriĝis al KEL, elektas memstare siajn reprezentantojn en la Asembleo. Je kiom da personoj rajtas unuopaj kluboj kaj societoj? Pri tio decidas la elekta komisiono surbaze de la preskriboj en la Statuto de KEL. La nombro de homoj en la Asembleo dependas de la kvanto de membroj de unuopaj societoj. **Tial ĉiu societo estas petata plenumi sian devon kaj informi la Elektokomisionon de KEL pri la stato de membroj**. **Ĉiu societo estas petata direkti al KEL sian membroliston por la jaro 2012**, **respektive 2013**.

Tiusence la Elekta komisiono en la lastaj tagoj de la jaro 2013 sendis perpoŝte la cirkuleran leteron al ĉiuj siaj membroj-asocioj, atendante iliajn respondojn ĝis la fino de januaro 2014. Pri tiuj respondoj la Komisiono informos la Estraron, kiu decidos pri la nombro de reprezentantoj kiujn ĉiu unuopa Esperanto-unuiĝo rajtas memstare elekti (laŭ preskriboj de sia Statuto.)

Ankaŭ individuaj membroj de KEL estis invititaj partopreni en la elektoj, per propra kandidatiĝo aŭ per kandidatigo de iu el la kroataj esperantistoj el la listo de individuaj membroj de KEL. Kroata Esperanto-Ligo havas aktuale 72 individuajn membrojn kaj ili rajtas havi 7 reprezentantojn en la asembleo.

Konforme al nia statuto, individua membro ne povas esti membro en iu societo kiu aliĝis al KEL. Male, ĉiu esperantisto povas samtempe membriĝi en pluraj esperantaj societoj.

Anto Mlinar

Jen la foto de la Esperanto-domo en Roterdamo, kie troviĝas Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio. La domo estis aĉetita en 1961.
Inter multaj leteroj kiuj venas al tiu ĉi adreso el diversaj flankoj de la mondo, enestas ankaŭ letero de la zagreba urbestro Milan Bandić, kun invito al Universala Esperanto-Kongreso en Zagrebo. Fotis Francisco L. Veuthey.

EN ZAGREBO

Frumatene la 13-an de decembro 2013, la grupo de 13 geesperantistoj el **Đurđevac** kaj **Bjelovar** ekvojaĝis per aparta buseto al **Zagrebo** por partopreni la festadon de Zamenhofa tago, kiun organizis Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE). Preskaŭ tuttaga programo (inter la 10-a kaj 16-a horo) okazis en la belega granda salono de Kroatia Ekonomia Ĉambro – Zagreba Ĉambro, en Draškovićeva strato 45.

Fotis I. Špoljarec

Tuj kiam la partoprenantoj alvenis, en la teretaĝa galerio de Ekonomia Ĉambro ili povis viziti la pentraĵekspozicion de korea esperantisto-pentristo **Ho Song**. La ekspozicio titolita Azia paletro estis malfermita dum la tuta tago.

La festadon ĉeestis preskaŭ cent geesperantistoj kiuj ĝuis tre diversspecan kaj abundan programon. Komence de la programo nin salutis la prezidanto de UZE **Radenko Milošević**. Post tio okazis prezento de la libro de fama mondvojaĝanto **Tibor Sekelj** *Padma, la eta dancistino*, kiun gvidis profesoro **Zdravko Seleš** el **Đurđevac**. Unue ni aŭdis lian tekston *Tibor Sekelj – homo al kiu ni envias*. Apartan etoson faris ĉeesto de la vidvino de nia Tibor, sinjorino **Erzsébet Székely**, kiu speciale alveturis el **Hungario**, kaj la nevino de Tibor sinjorino **Ljiljana Sekelj-Milenković**, kiu alveturis el **Serbio**. Sinjorino Erzsébet parolis pri *Fragmentoj el la vivo de Tibor Sekelj* per fotoj kaj samtempe projekciis fotojn el ilia familia albumo. Tiu programparto tre kortuŝis min. La recenzon pri la libro *La beleco troviĝas en simpleco* prezentis la beograda ĵurnalisto **Zlatoje Martinov**, kaj unu ĉapitron el la libro legis studento **Đivo Pulitika**. Parton de la recenzo de **Yu Jianchao** legis profesoro **Seleš**.

La dua ero de antaŭtagmeza programo estis Zamenhoftaga koncerto de operkantisto de la Opero de Kroata Nacia Teatro **Neven Mrzlečki**. Ĝuante la belegajn melodiojn ni apenaŭ rimarkis ke pasis proksimume unu horo.

Dum la paŭzo atendis nin riĉa lunĉo dum kiu ni precipe ĝuis la bonegajn kukojn kiujn preparis **Marijanka Pleadin**.

Post la lunĉo sekvis la dua programparto. Dum ĝi unue estis anoncita **Literatura konkurso *Ivo Rotkvić***, organizota flanke de UZE en la jaro 2014 .

Gajnintinoj de la unua kaj dua premioj de la Deklamkonkurso okazinta en **Bjelovar** pasintjare dum septembro, deklamis ankaŭ dum la Zamenhofa tago: la gimnazianinoj **Ana Luić** kaj **Arijana Tkalčec** el **Đurđevac** deklamis la poemon de **Julio Baghy** *Siberia lulkanto*, kaj **Marija Vešnik** el **Zagrebo** deklamis la poemon de **Dragutin Tadijanović** *Longe dum nokt'*.

Post tio sekvis, laŭ mia opinio, la plej emocia kaj instiga parto de la manifestacio: la infangrupo **Gajuletoj** el Zagrebo, el la Elementa lernejo Davorin Trstenjak kun belega danca kaj kanta programo (esperantlingva kaj kroatlingva). Ilin gvidis kaj akompanis akordione ilia instruistino **Silvija Fostač** el **Zagrebo**. Grandegan aplaŭdon ili akiris, kaj ni konkludis, ke ni devas pli multe labori kun juna generacio por interesigi ilin pri Esperanto. Junaj homoj šatas labori, sed ni devas trovi bonan manieron por doni impulson al ili. Gratulojn al la infanoj, kaj al ilia instruistino!

Saša Pilipović, aktoro de la urba teatro el **Kragujevac**, kiu festas kvaronjarcenton de aktorado en Esperanto, prezentis la scenludon *Rememoro*, dum kiu ni informiĝis pri lia kunlaboro kun la forpasinta, tre konata aktorino **Vida Jerman**.

El **Hungario** venis estraranino de TEJO **Veronika Poór,** kiu informis nin pri *Retradio Muzaik*o kaj *Kion faras TEJO nun?*.

Dum la rapida prezento de kelkaj intaj kaj ontaj projektoj flanke de la programgvidanto **Josip Pleadin** ni eksciis pri projektoj okazontaj en 2014.

En la fojero estis organizita libroservo kun jam eldonitaj libroj, sed por la Zamenhofa tago aperis du novaj libretoj: ***Jarlibro 2013 de UZE***, kaj *Dokumenta Esperanto-Centro 2010-2013*, en kiu vi trovos nomojn de ĉiuj personoj kaj asocioj kiuj kontribuis ion al DEC dum la menciita kvarjara periodo.

Ĉiuj ĉeestintoj ricevis la noveldonitan numeron 25 de la revuo **Zagreba esperantisto**.

Fine de ĉi tiu tre sukcesplena kaj solena festado oni devas danki al ĉiuj ĉeestintoj kaj gastoj, kaj precipe al Ekonomia ĉambro, kiu senpage disponigis al la organizanto la teretaĝan galerion, la grandan salonon, teknikaĵojn kaj personaron (kuiristinojn, vestogardistinon, son- kaj komputil-teknikistojn) kaj regalis nin per kafo kaj mineralakvo.

Mi esperas ke, ne nur mi, sed ankaŭ aliaj partoprenintoj de la festo, hejmen kunportis belajn impresojn, kaj ke ni renkontiĝos baldaŭ dum iu Esperanto-renkontiĝo ie ajn en nia bela lando.

Zdenka Polašek

EN RIJEKA KAJ TRIESTE

Fotis Giuseppe Valle

La Zamenhofa tago okazis en **Rijeka** en la societejo lundon la 16-an de decembro je la 18-a horo. Ĉeestis la kunvenon 10 societanoj. **Vjekoslav Morankić** parolis pri Zamenhofa tago, kaj ankaŭ pri solenaĵoj pri la Zamenhofa tago en **Zagreb** la 13-an kaj en **Trieste** la 14-an de decembro. En **Zagreb** en la programo partoprenis prelegantoj: **Radenko Milošević**, **Zdravko Seleš** pri **Tibor Sekelj**, **Erzsebet Sekelj** el **Subotica** pri fragmentoj el vivo de **Tibor Sekelj** kaj verkisto **Zlatoje Martinov** el **Beograd**. En la programo partoprenis ankaŭ **Đivo Pulitika**. Muzikis kaj kantis **Neven Mrzlečki**.

En **Triesto** dum la Zamenhofa tago estis prezentita libro **La kapreolido Pirgo**, la romano por infanoj de fama kroata verkistino **Anđelka Martić**. La libron tradukis esperantistino el **Rijeka Josipa Katunar** kaj eldonis **Grafokom** (la firmao de **Josip Pleadin**) el **Đurđevac**. La libron lerte kaj bonege prezenis **Edvige Ackermann**, kaj du belajn fragmentojn el la libro legis **Elena Zerpini**. **Vjekoslav** Morankić parolis pri kroata verkistino aŭtorino **Anđelka Martić**. En **Triesto** estis krome prezentitaj du libroj: la libro de **Srečko Kosovel** (slovena verkisto el **Triesto**) dulingva slovena kaj esperanta **V zlatnem čolnu** (**En la ora boato**) kaj la libro **Tie kaj tie Karstaj itineroj**, eldonita en Esperanto de Triesta Esperanto-Asocio.

V.M.

EN VARAŽDIN

Fotis Stanko Rukelj

New York Times publikigis ke **Varaždin** estas unu el 52 urboj de la mondo kiu meritas viziton en 2014**.** Varaždin estas je la 48a loko sur la listo de turisme plej interesaj allogaĵoj, rekomendataj de la gazeto. Esperantistoj el **Varaždin,** iniciatitaj de **Esperanto-Societo Trixini** el **Hrašćina** omaĝis al **Zamenhof** en la strato de sia samurbano **Božidar Vančik,** originala Esperanto-poeto**.**

En la strato nomita **Božidar Vančik** esperantistoj la 14an de decembro 2013 legis antologian poemon de **Vančik Al abortita filo.** Voĉlegis **Filip Crikvenčić.** Al la festantoj aliĝis la filo de la poeto**,** profesoro pri kemio, **D-ro Hrvoj Vančik,** rakontinte interesajn memorojn pri sia patro. La poemo **Al abortita filo** estas envicigita en ambaŭ antologioj de la originala Esperanto-literaturo**,** redaktitaj de **William Auld.**

Samtage la societo havis sian elektan jarkunvenon kaj tiamaniere plilongigis la vivon de la **Esperanto-Societo Božidar Vančik Varaždin,** en la 90a jaro de sia ekzisto**.**

La novelektita prezidantino estas **Snježana Rusman** kaj sekretario **Filip Crikvenčić.**

S. Š.

PROVIZORA PROGRAMO DE LA 10-a EEU-KONGRESO

6 - 12a de julio 2014 en Rijeka

Kongresejo: Hrvatski kulturni dom, Strossmayerova 1

DIMANĈO, la 6-an de julio 2014
10-22a horo Akcepto de la kongresanoj
14-19-a horo Kroata tago en EEU-kongreso
20-21,30 horo Folklora muzikprogramo de la folklora grupo el Rijeka

LUNDO, la 7-an de julio 2014
Granda salono:
10-12 h. Solena malfermo de la kongreso
14-15 h. Kongrestema prelego: Seán Ó Riain (prezidanto de EEU)
15-16 h. Kongrestema prelego: Milorad Pupovac (parlamentano de Kroatia parlamento, universitata profesoro)
16-17 h. Kongrestema prelego: Ivo Žanić (universitata profesoro el Zagrebo)
17-18 h. Aliaj prelegoj: Vjekoslav Morankić (membro de LKK kaj ekonomiisto): Esperanto kaj eŭropa identeco en EU
20-21,30 h: Teatro UMS el Svislando prezentas rok-operon en Esperanto
Malgranda salono:
16-18 h: Filmoj en Esperanto kaj filmoj kun esperantlingvaj titoloj
Tria salono:
10-18 h. Libroservo

MARDO, la 8-an de julio 2014
Granda salono:
10-12 h. Unua kunsido de la Asembleo de EEU (FERMITA, nur por la asembleanoj kaj anstataŭantoj)
14-15 h: Kongrestema prelego: Jagoda Granić , universitata profesorino el Split
15-16 h: Kongrestema prelego: Nikola Rašić (estrarano de EEU)
16-17 h: Aliaj prelegoj: Jozefo Reinvart (slovaka diplomato)
17-18 h: Aliaj prelegoj: Spomenka Štimec (sekretariino de KEL) Pri la plej granda tradukprojekto per Esperanto kiel lingva ponto
20-21,30: Koncerto de popularaj operarioj en Esperanto de Neven Mrzlečki
Malgranda salono:
10-12 h: prezento de novaj libroj (gvidas:Spomenka Štimec)
16-18 h: Filmoj en Esperanto kaj filmoj kun esperantlingvaj titoloj
Tria salono:
10-18 h. Libroservo

MERKREDO, la 9-an de julio 2014
8-19 h: TUTTAGA EKSKURSO (verŝajne ŝipekskurso al Kvarneraj insuloj)
Granda salono:
20-21,30 teatraĵoj plenumataj de Saša Pilipović kaj Georgo Handzlik

ĴAŬDO, la 10-an de julio 2014
Granda salono:
10-12 h: Dua (malfermita) kunsido de la asembleo de EEU: Strategio por Esperanto en EU
14-15 h: Aliaj prelegoj: Heidi Goes: Pri la indonezia lingvo kaj ties evoluo kiel ŝtata lingvo de Indonezio
15-16 h: Aliaj prelegoj: Velimir Piškorec: Universitata instruado de Esperanto en Zagreba Universitato
20-21,30 H: Koncerto je marimbo de Kaja Farsky
Tria salono: 10-18-a h. Libroservo
ALILOKE:
13-19 h: Duontaga ekskurso tra Rijeka kaj ĉirkaŭaĵo

VENDREDO: la 11-an de julio 2014:
Granda salono:
10-12 h: Publika debato pri ebla poresperanta agado loknivele en la moderna tempo
14-15 h: Faka kunsido de EDE
15-16 h: Faka kunsido de E@I kaj ĝia agado
16-17 h: Aliaj prelegoj: Zlatko Tišljar (estrarano de EEU) Zagreba Metodo instrui Esperanton
17-18 H: Faka agado
20-21,30 h Koncerto de la Zagreba grupo Druyd
Tria salono: 10-18 h. Libroservo
ALILOKE:
14-18 h: vizito al nova moskeo en Rijeka

SABATO, la 12-an de julio: 2014
Granda salono:
10-12 h: Solena fermo
Tria salono: 9-12 h: Libroservo

Kroata tago en EEU-kongreso en Rijeka planata

Pluraj el vi aliĝis al Eŭropa Esperanto-Kongreso en **Rijeka**. Eble kelkaj el vi ŝatus alveni kelkajn horojn pli frue dimanĉon la 6an de julio 2014 por diskuti pri Esperanto en Kroatio?

Ni invitas al komuna tagmanĝo la 6an de julio je la 13-a horo. Bonvolu antaŭvidi 50 kn-kotizon por la Kroata Tago kun komuna tagmanĝo. La ejo de la komuna tagmanĝo dependos de kvanto de viaj aliĝoj, ni manĝos verŝajne ĉe la restoracio proksime de la stacidomo.

Eblas komuna trajna transporto de **Zagrebo**. Ekiro je 7.50 h, alveno en **Rijeka** 12.35 h.

Post la tagmanĝo okazu **Ronda Tablo** je la 14a horo. **La Ronda Tablo** okazos en la kongresejo.

Folklora programo okazos vespere en la kongresejo je la 20a horo en la granda salono de **Hrvatski kulturni dom**, Strossmayerova 1.

S. Š.

Prezidento de Respubliko Kroatio aŭspicios Eŭropan Esperanto-Kongreson

„Mi utiligas ĉi tiun okazon por deziri al vi kaj viaj kunlaborantoj sukcesan organizon de la konferenco kiu per sia temo pri justaj lingvaj rilatoj en Eŭropo certe allogos fakan kaj pli vastan publikon.“

Tio estas la citaĵo el la letero de **D-ro Ivo Josipović**, prezidento de **Respubliko Kroatio,** kiun li adresis al la sekretario de **Eŭropa Esperanto-Unio, Zlatko Tišljar.** Per la letero **Prezidento de la Respubliko Kroatio** informis ke li transprenas aŭspicion de la **Eŭropa Esperanto-Kongreso** en **Rijeka.**

Z.T.

Kroata Esperanto-Ligo kandidatiĝis por Premio Cigno 2013

Konata japana mecenato **Etsuo Miyoshi** estas fama kiel granda favoranto de **Eŭropa Unio**. D-ro **Renato Corsetti** foje nomis lin „la plej granda eŭropano“. Inter aliaj helpoj kiujn **Etsuo Miyoshi** distribuas dum sia fervora agado pri Esperanto, trovigas **Premio Cigno** per kiu li volas aparte premii la landan asocion de **Eŭropa Unio,** kiu plej aktive informis ekster Esperantujo pri Esperanto en 2013 per diversaj amaskomunikiloj**.**

Kroata Esperanto-Ligo fariĝis en julio 2013 la nova membro de **EU** kaj akiris la rajton kandidatiĝi**.** La **Premion Cigno** por 2012 gajnis **La landa Asocio de Ĉeĥa Respubliko.** Ni sendis al **Japanio** la kolekton da niaj gazetartikoloj**,** TV- kaj radio-elsendoj kiuj en 2013 superis la numeron cent.

Ni dankas al ĉiuj kiuj helpas al ni kolekti artikolojn/informojn pri la elsendoj pri nia agado kaj kiuj sendas ilin al nia oficejo.

Ni informu tuj ke la fondinto de la **Premio Cigno** kaj posedanto de la fabriko **Cigno** ricevis ordenon de la japana imperiestro dum la solenaĵo la 12an de novembro 2013. Li meritiĝis per la invento kaj produktado de la speciala valizo WalkingBag. La valizo estas helpilo por homoj kiuj estas malhelpataj per fizika handikapo kaj ne povas bone marŝi. La valizo estas siaspeca marŝbastono.

Etsuo Miyoshi / S. Štimec

Festo honore al Marija Horžinek en Sisak

Esperantistoj el **Sisak** laŭ iniciato de **Srećko Radulović**, okazigis memorvesperon honore al **Marija Horžinek**, instruistino kaj esperantistino el **Petrinja**. Per la programo en la **Popola biblioteko kaj legejo Vlado Gotovac** Esperanto-Societo **Sisak** memoris la 4-an de novembro 2013 sian fondiĝon el la jaro 1978. (Post jaroj da interrompo la societo reaktiviĝis en 2008.)

La festo okazis kunlabore kun **Dokumenta Esperanto-Centro** Đurđevac. **Jadranka Gabriša Perković**, la iama lernantino de **Marija Horžinek**, parolis pri la aŭtorino. **Josip Pleadin** prezentis la verkon **La tilia urbo** kiun li esperantigis kaj eldonis laŭ la prozo de **Marija Horžinek Grad lipa**, eldonita en **Petrinja** en 1997, kiam la urbo reviviĝis post la militaj jaroj kaj **Marija Horžinek** revenis al sia detruita hejmo. (Kroata Esperanto-Ligo helpis ĉe renovigo de ŝia milite prirabita hejmo per pluraj kontribuoj de hejmaj iloj, donacitaj de la membroj de KEL. Marija plej multe aprezis akvovarmigilon por ŝia detruita banejo kiun ni muntis en ŝia hejmo.)

Ekspozicioj de la pentraĵoj de korea esperantisto **Ho Song** ornamis la feston samkiel la ekspozicio de **Zagreba Esperantisto.**

Ni citas el ŝia prozo**:**

Eble iu kiu min amis rekonos mian spuron kaj donacos al mi benon de sia memoro kaj tio signifos ke mia foriro tamen ne estis definitiva kaj eterna.

Nataša Dorosulić / Spomenka Štimec

Bildlibro pri Heliko Slavek

Centar za rehabilitaciju Sloboština (Centro por rekapabligo Sloboština) gastigis la 5an de novembro 2013 libroprezenton **Heliko Slavek en kampo de sunfloroj. Heliko Slavek** estas bildlibro kun la temo proksima al infanoj havantaj handikapon. La aŭtorino estas **Sonja Zubović.** La programon en **Centro Sloboština** prizorgis **Arta asocio Tekston,** kunlabore kun **Esperanto-Societo Trixini** el **Hrašćina.**

Esperanto-Societo Trixini prizorgas esperantigon de la bildlibro**.** Esperantigis **Judita Rey Hudeček,** lingva konsilanto **Davor Klobučar.** La verko estis proponita por persa tradukigo en **Teherano.**

S. Štimec

Fotis Barbara Weizer

Eble vi ofte vojaĝas al esperantaj renkontiĝoj, kaj eble ne. Eble vi regule vizitas vian lokan klubon, kaj eble vi restas en via hejmo. En ĉiu kazo vi povas bone uzi la interreton (=la reton) en via esperanta vivo. Vi povas kontakti kun aliaj esperantistoj, perfektiĝi en Esperanto, legi la literaturon aŭ novaĵojn, aŭskulti esperantajn radiojn ktp.

Siatempe Zamenhof skribis en sia poemo „Al la fratoj“ jene:

Tre malproksime ĉiuj ni staras
la unuj de la aliaj...
Kie vi estas, kion vi faras,
ho, karaj fratoj vi miaj?

Jes, vere la esperantistaro estas tre maldense „dissemita“ tra la mondo, sed la interreto esperantistojn forte proksimigas! Kaj se ili volas labori por Esperanto, tiu laboro estos multe pli efika ĝuste dank' al la interreto. Ne plu okazos, ke „cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas…“, almenaŭ mi tiel esperas.

Sed kion fari en la reto? De kie komenci? Kien iri? Respondojn al tio donas la resto de ĉi artikolo. Mi prezentos plurajn utilajn esperantajn servojn kiuj jam ekzistas rete. Grandan parton da ili realigis volontuloj, kaj volontuloj ilin daŭre prizorgas. Danku al ili, kaj ĝuu la servojn!

Esperanta Vikipedio (Vikio)

http://eo.wikipedia.org/

Vikipedio estas interreta plurlingva enciklopedio, verkata fare de volontuloj. Ĝi estas "libera", kio signifas ke ĉiu homo rajtas kaj povas ŝanĝi la enhavon de preskaŭ ĉiu artikolo. Sufiĉas havi aliron al la reto! Tamen estas certaj reguloj: la artikoloj estu en enciklopedia stilo, estu politike neŭtralaj kaj ne ofendaj. La komenco estis en 2001, kaj nun jam ekzistas Vikioj en 287 lingvoj (inter kiuj Esperanto, Ido, Volapuko kaj eĉ malmulte konataj eŭropaj regionaj lingvoj kaj dialektoj). Ekzistas jam 30 milionoj da artikoloj, el kio anglalingvaj 4,5 milionoj, nederlandaj 1,7 milionoj, germanaj 1,6 milionoj, japanaj 890.000, ĉinaj 745.000, esperantaj 190.000, kroataj 143.000 (serbaj 242.000, slovenaj 140.000) ktp. Esperanto ĉi tie superas la sekvajn lingvojn: slovakan, danan, bulgaran, grekan, litovan ktp.

Vikipedio estas foje kritikata pro ebla nefidindeco (ĝin povas redakti ankaŭ nefakuloj aŭ homoj malbonintencaj). Sed aliaj uzantoj estas sufiĉe multenombraj, do ili povas rapide korekti ĉiun nefidindan informon. Sed malgraŭ ĉio, Vikipedio estas gravega civiliza atingo, kiun oni povas ege bone uzi, kaj vere oni amase uzas ĝin.

Kvankam anglalingvaj artikoloj estas en Vikio multe pli nombraj ol esperantaj, kaj eĉ multe pli enhavoriĉaj, tamen esperanta Vikio estas tre utila kaj meritanta daŭre ekzisti kaj kreski. Jen kial:

- multaj homoj ne konas la anglan lingvon, aŭ almenaŭ ne sufiĉe flue por povi senstreĉe legi grandajn tekstojn
- foje vi serĉas ne nur unu vorton, sed multajn terminojn el iu fako. Se vi entajpas la vorton "triangulo", vi ricevos ne nur difinon de tiu unuopa vorto, sed tutan grandan artikolon kun multaj matematikaj terminoj rilataj al tiu parto de geometrio
- eĉ se Vikio ne ĉiam estas lingve korekta, per ĝi esperantaj komencantoj povas ekzerci la lingvon
- estas multe da aferoj el la esperanta movado, sed tiujn vi malofte povas trovi en nacilingvaj Vikioj, kaj certe ne tiom detale.

Reta Vortaro (ReVo)

http://www.reta-vortaro.de/revo/

ReVo estas ĝenerala esperante-esperanta vortaro, libere uzebla en interreto (kun tradukoj ankaŭ al pluraj naciaj lingvoj, en ambaŭ direktoj). Ĝi ofte estis mia helpilo dum verkado de miaj artikoloj kaj libroj. Imagu nur: dum vi tajpas komputile ian esperantan tekston, via komputilo paralele tenas Retan Vortaron preta. Se vi subite bezonas ian vorton aŭ detalan klarigon pri ia jam konata vorto, ĝi jam estas "sub viaj fingroj"! Mi forte rekomendas ReVo-n al ĉiuj verkantoj kaj tradukantoj!

Por montri kiel ĝi funkcias, jen unu ekzemplo. Mi entajpis la vorton "floro". La respondo estis artikolo konsistanta el:

- 4 signifoj de tiu vorto, klarigitaj per esperantaj frazoj
- ekzemploj de regula uzo de la vorto "floro"
- aliaj interesaj vortoj kun la sama radiko (flori, florado, floraĵo, floraro, ekflori, forflori, majfloro, martofloro, neĝfloro, sunfloro, florfolio), ĉiuj klarigitaj esperante
- la vorto "floro" en pluraj aliaj lingvoj (angla, belorusa, bretona, bulgara, ĉeha, franca, germana, hebrea, hispana, hungara, japana, kurda, latina, nederlanda, pola, portugala, rumana, rusa, sveda kaj turka). Eĉ volapuko estas, sed la kroata tute mankas. La vortaro havas ankaŭ koncernajn ilustraĵojn.

La vortaron redaktas grupo da homoj el diversaj landoj per la reto. Ĝi estas iom simila al la Plena Ilustrita Vortaro, sed eĉ pli bona ĉar:

- vi ne devas longe foliumi paperajn paĝojn, sed nur entajpi la celitan vorton
- tre utilaj estas la alilingvaj tradukoj. Ekzemple, min interesas la vorto "turdo" kaj esperanta klarigo estas simila al "mezgranda arbara birdo... el familio turdedoj...", el kio mi ne povas traduki la vorton kroaten. Sed vidinte la ĉehan, polan kaj rusan tradukon "drozd", tuj mi scias pri kio temas (kroate tutsame "drozd")
- se vi ne scias precize kiun vorton vi serĉas, ekzistas serĉo laŭ fakoj, aŭ laŭ komenca litero
- ekzistas ankaŭ nacilingvaj indeksoj, do vi povas vidi ekz. gemanlingvan alfabetan liston kaj sub la litero "B" trovi la vorton "Blume". Tuj videblas la esperanta traduko "floro", kaj se vi klakas tie per muso, prezentiĝos la esperanta artikolo por "floro", kiel jam menciite. Vi certe divenis, ke la kroata listo ne ekzistas. Fakte, estas nur kelkaj vortoj kiujn nekonata aŭtoro aldonis evidente nur por eksperimenta celo.

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (PIV)

http://vortaro.net/

Post 2 paperaj versioj de tiu ĉi utilega kaj dikega vortaro (en 1970, plus prilaboroj de 2002-2005), oni venis al la ideo, ke la reta PIV estus multe malpli kosta, kaj samtempe multe pli kvalita. Nome, oni povas en ĉiu momento aldoni novajn vortojn/klarigojn aŭ korekti erarojn - kaj post unu minuto jam la tuta esperanta mondo vidas la rezulton! Tial SAT (la unua eldonanto de la libroforma PIV) subskribis en 2010 kontrakton kun la junulara organizo E@I (legu "e-ĉe-i", t.e. "Esperanto ĉe Interreto"), kiu havis la projekton de la reta PIV. Sed por realigo de la projekto necesis ankaŭ mono, kiun oni ne havis. Tiam estis sendita peto al la tutmonda esperantistaro helpi per mondonacoj, kaj en 2011 la bezonata mono troviĝis. Kaj finfine en la aprilo 2012 aperis la senpage uzebla reta PIV.

Por ĝin uzi, vi devas unue registriĝi (ĉe la sama paĝo), sed la registrado estas simpla kaj senpaga. La nuna versio estas nur provversio ("beta-versio"), kaj tial grafike modesta kaj oferanta nur la plej bazan servon: vi entajpas esperantan vorton kaj aperas la koncerna esperanta teksto el PIV.

Ĉar PIV estas bazo por ĉiuj aliaj vortaroj, estas tre bone, ke ni ĝin havas. ReVo (Reta Vortaro) estas pli malnova kaj tre utila, sed PIV estas PIV, kaj por serioza tradukado ni bezonas ambaŭ vortarojn!

Radio Muzaiko

http://listen.radionomy.com/muzaikoinfo.m3u
http://www.esperanto.hr/muzaiko.htm
Slogano: "Mojoseco kaj muziko - Muzaiko!"

Radio-stacioj iam ofte elsendis en Esperanto. Kroatoj ankoraŭ rememoras pri esperantaj elsendoj de Radio-Zagreb (1953-1992). Eĉ Radio Osijek elsendis regule esperante en 1946 (proksimume), sed pri tio bedaŭrinde jam ne ekzistas informoj. Tamen, multaj esperantaj radio-stacioj iom post iom silentiĝis, ekz. la fama Pola Radio. Sed aperas novaj stacioj funkciantaj nur per interreto. Inter ili lastatempe tre elstaras Radio Muzaiko.

Ĝi elsendas ĉiutage kaj ĉiuminute! Kiam ajn vi ekdeziras aŭskulti, ĝi estas preta ĉe via komputilo aŭ poŝtelefono. Ne necesas, do, esti maldorma en iu nokta horo kaj serĉi en via radio-aparato kie, diable, estas tiu frekvenco ktp.

Verdire la programo de Muzaiko ĉiutage konsistas el nur 3 horoj da muziko kaj parolo, sed la tuta materialo ripetiĝas

ĝis la sekva tago, kiam aperas nova materialo. Nu, 3 horoj tage da esperanta aŭskultado sufiĉas al ĉiu ordinara homo, ĉu ne? Kaj se vi havas senpagan aliron al la reto, aŭ almenaŭ la aliron kun fiksa prezo, vi povas senzorge aŭskultadi kiam ajn vi volas. Mi, ekzemple, kun poŝtelefono kaj sendrata interreto aŭskultas la radion en ĉiu ĉambro de mia loĝejo.

Muzaikon volontule organizas neformala internacia grupo de junaj esperantistoj kunlaboranta per la interreto. La teamo aktive varbas por allogi novajn kunlaborantojn.

Pasporta Servo
www.pasportaservo.org

Pasporta Servo estas malnova kaj bone konata servo de TEJO, ĝi estas unu el la ĉefaj atutoj de esperantistoj kaj unu grava motivo por lerni Esperanton. Temas pri listo de esperantistoj gastigantoj (nun ĉ. 1.500 da ili, el ĉ. 90 landoj), kiuj akceptas en sia domo aliajn esperantistojn kiel gastojn. La gastigado estas ĉefe senpaga kaj sub difinitaj kondiĉoj de ĉiu gastiganto (nombro de gastoj, tagoj ktp.) Antaŭe TEJO publikigis ĉiujare adresaron de gastigantoj libroforme. Sed nun tiu kutimo estas malaperanta, ĉar ekzistas reta adresaro.

Neniam antaŭe estis uzado de Pasporta Servo tiom facila. Ĉiu esperantisto deziranta akcepti esperantajn gastojn povas sin anonci pere de interreto, kaj poste laŭbezone ankaŭ ŝanĝi mem siajn informojn. Kaj se vi estas "verda" vojaĝemulo, vi povas en la sama servilo facile trovi gastigantojn en la lando al kiu vi vojaĝus. Eĉ kontakti ilin rete.

Tamen, atentu! Lastatempe okazas iaj ŝanĝoj en la komputilo de Pasporta Servo. Kaj dum "laboroj kurantaj" eble vi foje ne sukcesos aliri ĝin.

Literatura Kafejo Esperanto
http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/literaturo.html

Jen paĝo kun granda indekso de esperanta literaturo, kaj originala, kaj traduka. Ĝi enhavas ĉ. 6.000 ligojn. Temas pri libroj kiujn vi povas legi kaj eĉ senpage preni al via komputilo. La kreinto, usonano Don Harlow, mortis en 2008, sed la paĝaro ankoraŭ funkcias.

Originala literaturo esperanta
http://esperanto.net/literaturo/

Alia granda indekso de esperanta literaturo, nun prizorgata de Sten Johansson.

Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko (PMEG)
http://bertilow.com/pmeg/elshutebla/index.html

Ni ĉiuj kredas, ke ni sufiĉe bone konas esperantan gramatikon por nia bezono. Sed tamen, foje antaŭ vi aperos demandoj. Aŭ viaj konatoj obstine havos pri iu gramatika punkto alian opinion ol vi. Tiam estos bonvena ĉi tiu paĝo. El ĝi vi povas ankaŭ elŝuti la kompletan gramatikon al via komputilo. La aŭtoro de PMEG estas Bertil Wennergren (aŭ simple: Bertilo).

Universala Esperanto-Asocio
http://www.uea.org/

Eble vi nian ĉefan tutmondan organizon opinias teda, senutila, burokrata… eble vi eĉ ne opinias ĝin via. Sed tamen vi povas trovi plurajn utilajn servojn en la paĝoj de UEA. Vi povas, ekzemple:

- membriĝi en UEA, rekte kaj sen helpo de via landa ĉefdelegito. Vi povas tion ankaŭ pagi en la sama paĝaro, per kreditkarto aŭ per via UEA-konto.
- aboni la revuon „Esperanto" (se vi jam ne abonis ĝin samtempe kun via membriĝo), kaj legi la revuon rete (antaŭ ol poŝtisto alportos al vi la paperan gazeton)
- foliumi katalogon de la librosevo de UEA kaj aĉeti elektitajn librojn (pagado ankaŭ helpe de la samaj paĝoj)
- vidi liston de delegitoj de UEA, laŭnome kaj laŭlande
- aliĝi rete al Universala Kongreso kaj pagi la kotizon, loĝigon, ekskursojn, vidi la liston de aliĝintoj ktp.
- kontakti la oficistojn de UEA kaj ricevi aliajn utilajn informojn.

Eventoj
http://www.eventoj.hu/

Iama gazeto el Hungario, sed nun ĝi aperas nur rete. Ĝi estis, estas (kaj espereble ankoraŭ longe estos) la ĉefa informilo pri esperantaj eventoj tutmonde. Organizantoj de esperantaj renkontiĝoj jam kutimas sendi anoncon pri tio al Eventoj. Do, se vi nepre volas vojaĝi al iu esperanta konferenco, festo, kultura aŭ faka aranĝo, vi unue vizitu ĉi tiun paĝon.

Sciu, ke Eventoj ofertas plurajn aliajn servojn por esperantistoj. Unu el ili estas t.n. „Selektitaj interesaj E-lingvaj retpaĝoj". La reston malkovru mem.

La Esperanta Gazetejo
http://www.gazetejo.org/

Arkivo de esperantaj gazetoj el multaj landoj. Senpaga. Sed ne ĉiuj jaroj kaj numeroj estas troveblaj. Nur tiuj, kiujn la redaktantoj bonvolis sendi al Gazetejo. Tamen tre interesa servo. Inter pluraj dekoj da gazetoj troviĝas ankaŭ la kroata „Tempo" (el 2008).

Kiosko
http://www.esperanto.se/kiosken/eo

Tutmonde konata paĝo, ne nur esperanta. Se vi volas legi nacilingvajn gazetojn (en la lingvoj de koncernaj landoj), vi povas uzi tiun ĉi servilon. Ĝi ofertas al vi liston de landoj, kaj post elekto liston de gazetoj de tiu lando. Nome, hodiaŭ preskaŭ ĉiu grava gazeto havas en la reto sian paĝaron, kaj tie oni povas vidi novajn aŭ almenaŭ malnovajn numerojn. Konsideru, ke gazetoj foje ŝanĝas sian adreson kaj la listo tiel malaktualiĝas. Tamen multaj homoj ankoraŭ uzas ĉi paĝon.

La forumo „soc.culture.esperanto"
https://groups.google.com/forum/?hl=eo#!forum/soc.culture.esperanto

soc.culture.esperanto estas la plej populara esperanta novaĵgrupo (angle: newsgroup), aŭ pli simple „forumo". En ĝi oni diskutas pri ĉio ajn en Esperanto (aŭ pri Esperanto en ĉiu ajn lingvo). Inter la ofte diskutataj temoj troviĝas mondpolitiko kaj lingvoj.

Ankaŭ vi povas partopreni, ĉu farante novan temon, ĉu respondante al la jam ekzistantaj temoj. Tiel aperas pluraj diskutoj. Eĉ se vi mem ne partoprenas la diskutojn, tamen vi povas ilin almenaŭ legi. Kaj ĉiun oni povas legi ne nur dum ĝia daŭro, sed ankaŭ monatojn poste.

Esperantaj gazetoj
http://www.liberafolio.org/
http://esperanto.org/Ondo/

Du esperantaj gazetoj, kiujn mi rekomendas. „Libera Folio" ĉefe skribas pri la esperanta movado (rete kaj senpage). Ĝi estas tre aktuala, sed ankaŭ senkompata. „La Ondo de Esperanto" el Rusio ankaŭ prezentas temojn el la movado, sed multajn paĝojn ĝi dediĉas al la literaturo.

Libera Esperanta Kantaro
http://kantaro.ikso.net/
Tekstoj de centoj, eble eĉ miloj da kantoj en Esperanto.

Koresponda Servo Universala
http://esperanto-plus.ru/koresponda-servo/

Koresponda Servo de „edukado.net"
http://www.edukado.net/komunumo/korespondaservo

Diversaj naciaj esperantaj asocioj
Esperanto en Germanio: http://www.esperanto.de/
Esperanto en Hungario: http://www.eszperanto.hu/
Esperanto en Italio: http://www.esperanto.it/
Esperanto en Britio: http://esperanto.org.uk/
Esperanto en Japanio: http://www.jei.or.jp/hp/esp.htm
Esperanto en Irano: http://www.espero.ir/
Esperanto en Brazilo: http://esperanto.org.br/bel/

Davor Klobučar

Kroata Esperanto-Ligo KEL
http://www.esperanto.hr

La landa asocio de Kroatio, de „bela nia patrolando“, estas tre aktiva, kvankam la lando malgrandas. La TTT-paĝaro de Kroata Esperanto-Ligo estas enhavoriĉa. Multon interesan trovos tie ne nur kroataj esperantistoj, sed ankaŭ alilandaj. Grandparte ĝi estas dulingva: esperanta kaj kroata. La kroata parto ofte estas uzata fare de ĵurnalistoj skribantaj pri enlandaj esperantaj eventoj.

Mi mencias ĉi tie nur kelkajn partojn de la paĝaro, kiujn mi trovas gravaj:

- Reta kurso de Esperanto ĉe:
http://www.esperanto.hr/eo/index.html.
Ĝi estas kroatlingva, laŭ pligrandigita zagreba metodo.
- Galerio de kroata esperanta historio ĉe:
http://www.esperanto.hr/galerio.htm.
La historio ekde 1889 ĝis hodiaŭ estas ĉi tie montrita per multaj fotoj kaj per tre konciza (dulingva). Videblas tie ĉiuj gravaj eventoj, objektoj, homoj kaj rezultoj de la 120-jara esperanta movado, prezentitaj en kronologia ordo. Estas ankaŭ sub-galerioj por Osijek kaj Rijeka. La galerio estas rezulto de mia pena laboro, kaj estas unikaĵo en la esperanta mondo.
- Kroata Esperanta Reta Legejo ĉe:
http://www.esperanto.hr/citaonica.htm.
Vi povas tie legi originalajn poemojn de kroataj esperantistoj, tradukojn el la kroata nacia literaturo en Esperanton, raportojn pri literaturaj projektoj de kroataj esperantistoj, scienc-stilajn tekstojn pri la landa esperanta historio kaj esperanta literaturo, kelkajn gravajn verkojn el la ĝenerala esperanta movado ktp.
- Kolekto de video-materialoj, iuj speciale interesaj por kroatoj:
http://www.esperanto.hr/video_kolekto_1.htm.
Al mi la plej kara video estas tiu kiu dum kelkaj sekundoj montras Zamenhofon. Kiu ja filmis lin, kaj kiu nur savis la fimon ĝis hodiaŭ?
- Kolekto de esperantaj elsendoj de Radio Zagreb (1953-1992), apenaŭ savitaj!
http://www.esperanto.hr/parolas_radio_zagreb.htm
http://www.esperanto.hr/audio_jurkovic.htm

- Aktualaj novaĵoj en la kroata esperanta movado, troveblaj en la ĉefa paĝo:
http://www.esperanto.hr/
sub la titolo “AKTUALE”, laŭ inversa kronologia ordo.

Davor Klobučar

Seminario pri planlingvoj ĉe Filozofia fakultato en Zagrebo

Post sukcesa seminario pri **Interlingvistiko kaj strukturo de Esperanto** en somera semestro de akademia jaro 2012/2013-a, profesoro **Velimir Piškorec** daŭrigis diskonigi Esperanton ĉe Filozofia fakultato en **Zagrebo**. En la vintra semestro de la kuranta akademia jaro li prelegis pri **planlingvoj** al grupo de ĉirkaŭ 40 gestudentoj de la germana lingvo kaj literaturo. Intereso pri seminario estis granda kaj ni esperas ke iu el partoprenantoj pli okupiĝos pri Esperanto. Guste tial en unu el la lastaj lecionoj de seminario venis **Mihaela Cik** por prezenti **Studentan Esperanto-Klubon** kaj aliajn kroatajn kaj internaciajn organizaĵojn kiel Kroata Esperanto-Ligo, Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj, Kroatia Esperanto-Junulara Asocio, Universala Esperanto-Asocio kaj Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Ŝi ankaŭ rekomendis al ili utilajn retajn paĝojn kaj proponis daŭrigon de ilia lernado per kurso de la Internacia lingvo, kiun organizus SEK. La prelego finiĝis per invito al ĉi-jara MIRO kaj aliaj esperantlingvaj eventoj. Espereble tio estas nur bona komenco de kunlaboro inter partoprenantoj de seminario kaj la Esperanto-movado en **Kroatio**.

Mihaela Cik

Nova prezidanto de Esperanto-Societo Split

Slobodna Dalmacija de la 23a de decembro 2013 informis en la artkolo de **Davor Grgart** ke en la elekta jarkunveno de la societo la novelektita prezidanto estas **Anđelko Drnasin**. La gazeto samtempe invitis al Esperanto-kursoj.

D. Grgat

Mesaĝo el Hrvatska Kostajnica

Urbestro de Hrvatska Kostajnica **Tomislav Paunović** respondis al Kroata Esperanto-Ligo ke la urbo ne povas akcepti la proponon de Kroata Esperanto-Ligo nomumi straton laŭ esperantistino **Antonija Jozičić**. „La nomŝanĝo de iu ajn ekzistanta strato aldone finance ŝarĝus la civitanojn de **Hrvatska Kostajnica.** Pro la supre menciitaj kialoj**,** ni devus prokrasti la nomumon de la **Strato de Antonija Jozičić.“**

Laŭ la letero**,** la urbo daŭre tenos en memoro la bezonon nomumi la straton laŭ **Antonija Jozičić,** instruistino kaj esperantistino**.**

S.Š.

Feliĉan Kristnaskon!
Sukcesan jaron 2014!

JAŜA LA DALMATO - VICREĜO DE GUĜERATO

de Ivana Brlić-Mažuranić

En Istanbulo antaŭ kelkaj jarcentoj (en 1470) vivis junulo, efektive ankoraŭ knabo, forta, sana kaj aparte lerta. Lia mastro kaj kamaradoj nomis lin Jaŝa la Dalmato. Jaŝa, kun pluraj aliaj junuloj el la Adria marbordo trafis en la turkan sklaviĝon, kiam la turkoj, post iu el siaj venkoj forrabis kaj sklavigis ĉiujn ĉe sia limo, eĉ ĝis la dalmata marbordo. Alkondukita kiel sklavo al Istanbulo, Jaŝa, kompreneble, vivis en malhavo kaj mizero - sed lia energia spirito plenis de espero kaj deziro leviĝi al iu pli digna vivo. La vestoj sur Jaŝa estis mizeraj kaj ŝiritaj, liaj piedoj nudaj kaj helaj hartufoj senorde falis ĝis la ŝultroj. Ĉio ĉi donis al li veran aspekton de mizerulo - sed lia svelta kaj altstatura korpo kaj la nigraj, nekutime grandaj kaj brilaj okuloj montris kioma decidemo kaj kioma fajro kuŝas en tiu knabo.

Jaŝa vivis en la hejmo de la mastro komercisto, kiu estis aĉetinta lin. Li vivis en mizera, sed grandega istanbula antaŭurbo, kie en grandega tumulto kaj meze de grandega malpuro kolektiĝis tioma miksaĵo de popoloj, tioma aro da mizeruloj, tioma tumulto de etaj komercistoj, vendistoj, kaj ankaŭ de trompistoj ke ĉiun knabon samaĝan kiel Jaŝa, tiu medio povus fari aŭ kovardo aŭ krimulo. Sed en ĉi tiu malpura medio Jaŝa en sia animo kunportis neforviŝeblan puran fundamenton, li kunportis la rememoron pri la blankaj, sunaj sablobordoj, pri la brilaj, karstaj dalmataj bordoj. Krom tio profunde en lia animo stabiliĝis la bogumila religio, kiun sklavigita ĉi tie inter la nekredantoj li devis kaŝi, sed kies mallongaj, sed koncizaj preĝoj ĉiam donis forton al li dum la mizero kaj konsilojn ĉe la malfacilaĵoj de la sklava vivo.

Ĉiam vigla, ĉiam preta fari iun ajn laboron, en la hejmo de sia mastro Jaŝa plenumis diversajn hejmlaborojn lerte, rapide kaj facile. Kaj ĉar per sia jen sonora jen dolora dalmata kanto li scipovis gajigi kaj kortuŝi la hejmanojn kaj la mastron, ĉi tiu, do tute ne urĝis por forvendi la junan sklavon.

Kiam ajn Jaŝa, fininte la hejman laboron, kaptis iom da libera tempo, li pasigis ĝin sur la istanbula albordiĝejo de la ŝipoj kaj promenis laŭ la bordo de tiu grandega mondhaveno. Multaj velboatoj kolektiĝis ĉi tie, sennombraj malpligrandaj ŝipoj, sveltaj rapidboatoj kaj barkoj ĉiaspecaj ĉirkaŭvagis tie, krozis, albordiĝis, debordiĝis, batadis per la remiloj kaj stiriloj. Neniam, eĉ dum plena kalmo, la maro povis trankviliĝi apud ĉi tiu sennombro de la komercaj, militaj kaj ankaŭ luksaj nababaj ŝipoj kiuj pro siaj kontaktoj estis devigataj eniri en tiun centron de la markomerco. La okuloj de Jaŝa atente sekvis ĉiujn movojn de la ŝipoj kaj tiel, de tago al tago observante tiun aron da ŝnuroj kaj ŝnuretoj sur la veloj kaj mastoj. Jaŝa ĉizis sian menson. Li volis enprofundiĝi en ĉiun enigmon kaj ĝin solvi sola sen instruo. Per la propra rezonado li solvadis la sencojn kaj la taskojn de tiuj sennombraj ŝnuretoj. Ekde la plej frua infanaĝo Jaŝa amis la ŝipojn, kaj eĉ estante knabo li konsideris ilin vivestaĵoj. Ĉe sia dalmata naskiĝbordo li provadis per simpla fiŝbarko viziti kaj ĉirkaŭnavigi la danĝerajn rifojn kaj malprofundaĵojn.

Kaj la grandajn velŝipoj, kiuj aperadis sur la marvasto aŭ de tempo al tempo albordiĝidis al lia naskiĝbordo li observadis per okuloj dezirplenaj. Nun la diverseco, abundo kaj la vervo de la istanbula haveno estis por li nepriskribebla allogo. Li ofte kutimis transsaltante el unu barko en la alian veni tutproksime al grandaj velŝipoj, kaj tiam li tuŝadis iliajn rondajn katraniĝintajn trunkojn klopodante deĉifri ilian strukturon. Tute lante Jaŝa serĉis manieron konatiĝi kun la maristoj por ke ili permesu al li vidi la internon de ilia ŝipo, la dislokiĝon de la enŝipigita varo, la ligilojn de la veloj, la maristajn kuŝejojn kaj la tutan tutsimplan sed tiel fortan strukturon de la tiama marista vivo. – Neordigita, sendigna kaj malpura tia interno de la ŝipo impresis al ĉiu knabo edukita al komforta vivmaniero. Male, por Jaŝa tia konsiderado de la velŝipa aranĝo estis mirinda. Al li ĉiu ŝipo kunportis la spiron de tiu por li nekonata malproksimo el kiu ĝi elnavigis kaj al kiu ĝi denove alnavigos tuj kiam bona vento poŝos ĝiajn blankajn malferlitajn velojn.

Tiel Jaŝa konatiĝis kun la maristoj de iu portugala ŝipo. Multaj portugalaj komercaj kaj ankaŭ militaj ŝipoj tiutempe venadis en la istanbulan havenon. La portugala reĝo Alfonzo la 5-a, la afrikano kaj la sultano Mehmed la 2-a malgraŭ la naturaj diversecoj, estis ligitaj per pluraj komunaj profitoj. Tiujn du regantojn plej multe kunligis unuflanke la batalo de la Otomana imperio kontraŭ Egiptio kaj aliflanke la deziro de Portugalio certigi por si senĝenan komercan vojon al la riĉaĵoj de Hindio.

Ivana Brlić-Mažuranić (1874-1938)

Dum la vesperaj horoj Jaŝa venadis al la portugala ŝipo, sur kiu, inter la aliaj maristoj estis ankaŭ Viŝko, Dalmato same kiel Jaŝa. Vive kaj ilustre Viŝko rakontis pri la beleco, pri la lukso, pri la trezoro kaj riĉaĵoj de Hindio. - Dum sur la vespera trankviliĝinta ondaro silente luliĝis la nigre kolorigita ŝipo, la du dalmatoj en ĉi tiu malproksima haveno, kie kunvagis la deziroj kaj voĉoj de tiomaj popoloj, ili interparolis per sia denaska lingvo.

Viŝko, kiu estis sparte matura maristo, scipovis belege rakontadi dum Jaŝa, juna kaj plenforta soife aŭskultis tion kion Viŝko rakontis pri la mirindaĵoj de Hindio.

- Kiam malfrue nokte Jaŝa revenadis hejmen post tiaj interparoloj, li estis tute okupita pri tio kion li aŭdis.

- Ĉu tie kie estas tiom da abundo, ĉu tie ne estus loko kaj vivo por Jaŝa la Dalmato? - demandis sin la junulo ekscitita, kaj kiam poste apud du tri aliaj sklavoj li kuŝiĝis sur malnovajn sakojn sub malalta tegmenteto apud la ĉevalstalo, Jaŝa tiom enpensiĝis, ke li forgesis sur kia mizera kuŝejo li ĉi tie kuŝas kaj kiom malproksimas de li kaj de lia vivo ĉiuj ĉi mirindaĵoj pri kiuj li revas. La fascinita fantazio alportadis al li sennombrajn aspektojn de luksaj palacoj; li rigardis sin mem en riĉaj vestoj kaj antaŭ ĉio li alsorĉis al si grandajn militbatalojn kaj la militgloron kiu al li alportas ĉiam pli grandajn sukcesojn.

Kiel la povrulo, la juna sklavo, povis eĉ revi pri tiel aŭdacaj - neeblaj revoj? Jen kiel la filon kaj la nepon de la dinaraj batalantoj edukitan ĉe la kantoj de blinda guzlisto logis antaŭ ĉio la militgloro. Kaj ĉar Jaŝa estis alkultimiĝinta pensi sentime pri turmentoj, pri la streĉoj kaj pri la danĝeroj de la milita vivo, li do en si fantaziado ĝuste trans tiu danĝera ponto konstruadis la vojojn al la imagataj sukcesoj.

Sed la naturo de Jaŝa estis bonŝance komponita. Apud tiel riĉa fantazio, li tamen estis plena de prudento kaj konsciis pri kritiko. Li sciis ke per tia vana fantaziado li neniam forlasos tiun ĉi mizeran kuŝejon.

- Viŝko, li diris iun vesperon al la maristo.

- Ni ekagu!

- Kaj pri kio?

- Ĉu ne ĉe vi en Vis, samkiel ĉe ni, ekzistas pafcelado per pafiloj? La pafistoj aliras sinsekve kaj surtretinte la novan ŝafkovrilon, ili pafos al la celo, kaj kiu el ili iĝos la plej sukcesas ĉe la celado, ties estos la ŝafkovrilo.

- Vi blagas! - Viŝko ekridis kaj anstataŭ respondi li kliniĝis kaj prenis iun rondan lignopecon kiu kuŝis sur la feroleko antaŭ li. Li ĵetis ĝin per akra svingo kriante.

- Rigardu la nigran! - La lignopeco fajfante ekflugis tra la aero kaj trafis la unusolan nigran laron, kiu meze de granda griza lararo balanciĝis sur la ondaj kvindekon da paŝoj for de la ŝipo.

- Tiel, mia Jaŝa, oni ĉe ni sur Vis celpafas permane kaj perarke. Ne ekzistas sufiĉaj ŝafkovriloj bezonataj por la plej bonaj pafistoj sur la insulo Vis.

Tiam Viŝko rakontis al Jaŝa kiel ĉe ili en la urbo de jaro al jaro oni elektas po ses honorajn pafistojn kiuj okaze de atako devas posteni sur ses plej gravaj defendlokoj. Kaj tiuj pafistoj, estas tiam lertaj, ke kelkaj el ili dum la festotagoj partoprenas la danĝeran ludon. Sur ŝnuro streĉita inter du mastoj pasas la Visa pafisto, dum sur la malproksima bordo staras pendigita ringo. Paŝante sur ŝnuro la pafisto haltas dum momento, streĉas sian arkon, kaj la sago senerare forigas de pendigitan ringon.

Jaŝa nun eĉ pli insiste komencis peti Viŝkon ke li konigu

al li la pafadon kaj fine Viŝko promesis ke li havigos, aŭ se necese eltajlos la arkon kaj la sagojn. Sed estis ja nek facile nek sendanĝere por la sklavo havigi arkon kaj sagon.

Kelkajn tagojn post tio Jaŝa malsupreniris frue antaŭ aŭroro malsupren al la bordo. Li kunportis sitelon por ĉerpi maron por la hejmbezono. Estis ankoraŭ mallume, la matena nebulo sterniĝis super la maro. Nur mastoj, kiel sveltaj turoj elstaris el la blanka nebulkovrilo. Regis kompleta silento. La maristoj dormis en la ŝipoj. Nur kelkiu maristo-gardisto sur la ferdeko streĉis siajn frostitajn membrojn. Al Jaŝa tia matena muto ĉiam ŝajnis mistera, kaj li haltis dum momento por laŭkutime nombri la mastojn en ĉi tiu parto de la haveno.

Tiam li subite aŭdis ke en ĉi tiu silento akre kaj senespere krias ies maljunula voĉo. Al Jaŝa laŭ la bordo kuris la maljuna otomano, la komercisto Jusuf.

Li kuris, veis, braksvingis, kaj dumkure per fingro montradis al la eniro en la havenon. Tie, tra la nebulo videblis nigra, sufiĉe granda ŝipo unumasta. Ĝi luliĝis neligita, senpere apud la bordo, ĝi turniĝadis jen tien jen ĉi tien, kaj ĉiumomente minacis la danĝero ke ĝi alfrapu la ŝtonaron de la bordo.

- O, o kiaj paganaj uloj! Ambaŭ forlasis la ŝipon, malamikoj miaj sangaj! - siblis kaj grakis la maljunulo.

Tio ja estis lia ŝipo, ĝi malliberiĝis dum la nokto, kaj ĉar ambaŭ gardistoj estis foririntaj por distriĝi en la urbo, la ŝipo forvagis dum la nokto ĝis la eliro de la haveno.

- Allaho min helpu! - per ĉiam nova senespero kriis la maljuna Jusuf.

- Kaj tiuj du, kiam ili revenos, amin! - ŝercis Jaŝa.

Jusuf daŭrigis kuri kaj per la krio veki kaj voki la maristojn de la aliaj ŝipoj, ke ili venigu lian ŝipon. Li kuris kiom liaj maljunaj fortoj al li permesis. Li kuris per tiu aparta otomana maniero tenante dumkure la supran korpoparton kiel eble plej rekte, ĵetante la krurojn antaŭ, ne malantaŭen, kiel oni alie faras dum la kurado.

- Helpu, kiu estas amiko! Jusuf kriegis por alarmi la havenon. Sed la maljuna komercisto estis konata pro sia avareco, kaj do nun la maristoj el pluraj ŝipoj per ironio observis la malproksiman velboaton kaj ne urĝante nur komencis interkonsentadi kiu iros kaj ĉu oni iros preni ĝin.

La titolpaĝo de la unua eldono de "Jaŝa la Dalmato" el 1937.

Kaj la ŝipo tie en la malproksimeco luliĝis sencele kaj nelogike. Ĝi luliĝis eĉ pli ĝoje, ĉar ĝi estis minacata trafi la plej grandan ŝtonon de la bordo. Tiam ĝi denove hazarde kaj tute ne atendite faris bonan returnon por tuj poste denove reveni al la plej danĝera loko.

Forlasis ĝin la homoj kaj do ĝi agas tiel kiel agus la kapo, se la cerbo ĝin forlasus. La homoj serĉis kaj sin malrapide preparis por helpi la ŝipon konstante inicitante la maljunan avarulon.

Tiam la senespera Jusuf, kiu vane urĝigis la malicajn maristojn, rimarkis ke de la bordo debordiĝis iu barko.

- Ne kriaĉu tiome - Jaŝa la Dalmato kriis el la barko. - Mi alveturigos ĝin al vi!

Nun Jusuf eĉ pli ekscitiĝis. - Ne kredu lin, homoj! Krimulo senhonta! Kiel li, la verdulo alkondukus tiom grandan ŝipon?

- Mi alveturigos ĝin al vi, oldulo! - Jaŝa ekkris denove. - Ĝi venos al via polmo kiel malsovaĝa kolombino!

- Venigu, venigu ĝin kolombo! - Jusuf subite aliis. - Venigu ĝin! Kolombojn vi satmanĝu! - Sed vi ne alkondukos ĝin, neniulo! Vi frakasos ĝin fripono almozula! Jen, vidu! Atentu homoj kiel feroce li remas! Remu! Remu! Vi stela filo! - deliris tiel la maljunu avarulo, babilaĉis tion kaj jenon pro ega zorgo, saltadis tien kaj renen kiel pasero kaj per la manoj premadis la kapon.

Esperantigis Lucija Borčić
Entajpis Marija Belošević

Tibor Sekelj en RAF



RAF estas Revuo de Amatora Filmo en **Zagrebo** okazinta de la 25a ĝis la 30a de novembro 2013. La 28an de novembro 2013 en Studentski Centar - Teatar ITD estis prezentita filmo **Laŭ la vojoj de Tibor Sekelj. Stipan Milodanović** el **Subotica** estas la aŭtoro de la filmo daŭranta 92 minutojn per kiu li dokumentis sian veturon tra **Argentino**, **Ĉilio, Bolivio**, **Peruo**, **Brazilo**, sekvante la spurojn de **Tibor Sekelj**. Akompanis lin dum la esplorvojaĝo lia amiko **Josip Fülle.** Dum **Stipan** foriris al **Patagonio, Josip** surgrimpis **Akonkagvon.** Tamen li ne iris ĝis la supro**,** en la antaŭlasta ripozejo antaŭ la montopinto li **„**nur" filmis helikopteron**,** serĉanta la viktimiĝintan grupon, kiu ekiris antaŭ li**.**

Aparte kortuŝa estis esplorado laŭ la spuroj de **Kumeaŭaŭ** en **Brazilo** kaj renkontiĝo kun la parencoj de la heroo kiun per Esperanto konas multaj legantoj dise tra la mondo**.** La sceno kiam maljuna parenco de **Kumeŭaŭa** el la tribo **Kaĵari** trarigardas desegnojn pri **Kumeaŭaŭ** estas absolute unika.

Al esperantistoj speciale plaĉis la esperantlingva fragmento de la filmo dum la intervjuo de oficisto en **Esperanto-Klubo** de **Bonaero** kaj malkovro de la susbrkibo de **Tibor** en la gastolibro de la klubo.

Ĉu Universala Kongreso de Esperanto en **Bonaero** havos tiun filmon en sia programo?

S.Š.


Hodiaŭ estis por mi feliĉa tago, ĉar mi renkontis multajn malnovajn amikojn, kaj akiris plurajn novajn! Dezirus multe da feliĉo al ĉiuj, kiu renkontiĝu,
Bs. As. 17. IV. 1978. Tibor Sekelj

Vodnikova 9
nia estonta ejo

681. Đivo Pulitika	13,08 eŭroj
682. Blanka Pavlović	130,89 eŭroj
683. Spomenka Štimec	5,00 eŭroj

En decembro 2013 KEL kolektis inter siaj membroj 148,97 eŭrojn.

Ekde la jaro 2003 KEL kolektis inter siaj membroj 28.319,28 eŭrojn.

Nia granda kredito de 50.500 eŭroj reduktiĝis al 7.752,11 eŭroj.

Aliaj kaj la lastaj kreditoj:

Kredito al Esperanto-Societo „Trixini" 16.560,60 eŭroj.

Kredito al Esperanto-Societo Rijeka: 2.464,15 eŭroj.

Dankon al ĉiuj kiuj helpis al ni havi la propran Esperantejon en Zagrebo!

Nia bankonumero en Raiffeisen-Banko: Hrvatski savez za esperanto IBAN HR6124840081100881157.

Memorigo:

Kiam ni aĉetis nian ejon en Vodnikova en 2003, ni pagis por ĝi 108.000 eŭrojn. Ni devis pagi aldone imposton de 5.000 eŭroj. Sume ni pagis 113.000 eŭrojn.

Ĉu ni translokiĝos al Vodnikova 9 en 2014? Nun ni ankoraŭ rajtas uzi la ejon en Knez Mislav 11. Kiom longe? KEL povus uzi parton de niaj ejoj en Vodnikova dum la alia parto de Vodnikova estu loĝata, por ke ni povu pagadi la kreditojn.

VITEJLEGOMAĴO

Kiam el Pritiščina mi venadis al Talež
Mia kuzino Danka kaj ŝia edzo
Kutimis inviti min al tag- aŭ vespermanĝo.
Danka tiam alligis antaŭtukon,
Prenis tranĉilon kiel solan ilon bezonatan
Kaj direktiĝis al la vitejo antaŭ Duboka.
Tie en la antaŭtukon ŝi vice enmetadis
La plukitajn seneciojn, sovaĝan aliumon,
Fenkolon, diversajn memkreskajn legomojn,
Kelkajn foliojn de folibeto aŭ brasiko,
Unu-du peponojn kaj foliojn de flavaj floroj
Kelkajn fazeol- aŭ fabogušojn.
Ĉion ĉi ŝi hejme purigis aŭ bone lavis
Kaj en ne multe da akvo kuiris kun 2-3 terpomoj.
La tuta kuirejo vitamine bonodoris.
Estis en tio ĉiuj odoroj kaj frandgustoj de la mondo!
Kiam la varman legomaĵon ŝi spicis per olivoleo
Kaj ĝin servis kun malmole kuiritaj ovoj aŭ geruloj
Kun freŝa pano kaj ruĝa vino,
Kiu ekdezirus ion pli bonan?
Ah, se tion mi povus frandi hodiaŭ
En la maljunulejo!

Lucija Borčić

Pritiščina *(insulo Vis). Fotis Ivan Špoljarec.*